Vasilij Devjatnin,

# Printempo

Printempo venas! Vivon donas
Al ĉio belulina veno :
Varmege suno jam proponas
Radiojn siajn, kaj mateno
Vizaĝon belan kun rideto
Al ĉiuj montras; jam de l' montoj
Kun bruo fluas rivereto
Kaj detruataj estas pontoj.
Denove ĉio reviviĝas,
Kantadas venon de printempo . . .
Por mi nur daŭras, ne finiĝas
Malbona, malvarmega tempo!
Por mi ne estas suna lumo,
Kaj de printempo bela veno
Nenion donas . . . Nur mallumo,
Mallumo sola kaj . . . ĉagreno!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1042-2117 (2014-06-05 09:23:53)*

*Tiu poemo troviĝas ankaŭ en* `http://www.ipernity.com/doc/rafmagon/10088867`*. Mi, Manfred Retzlaff, kopiis ĝin el tiu retejo. Pri la aŭtoro vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`*.*